

Pola

Esperantisto

Esperantysta Polski

XXXII JARO

NRO 10

OKTOBRO 1938

ELDONANTO — WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ — REDAKTORZY

PROF. DR. ODON BUJWID — MGR TADEUSZ HODAKOWSKI

Aperas la 20-an de ĉiu monato. Redakcian materialon oni petas sendi ĝis la 10-a de ĉiu monato. La redakcio estas rajtigita laŭ bezono ŝanĝi la tekston de manuskriptoj.

ANKORAŬ NI NE ESTAS PRETAJ AL LA FINA VENKO!

Granda pariza ĵurnalo asertas, ke inter la francaj poŝtovicistoj mankas esperantistoj por utiligi la permeson de la ministro.

La lasta jardeko metis la internacian lingvon inter la okazintaĵojn de tutmonda skalo. En multaj landoj la E-movado povis noti gravajn akirojn, esperigantajn, ke la fina venko proksimiĝas. Inter tiuj landoj oni povas noti Nederlondon, Ĉeĥoslovakujon, Hispanujon, Japanujon kaj al. Aliflanke, preskaŭ samtempe, en aliaj landoj, nia movado ricevis fortan baton, kvankam ne mortigan (ho, tute ne!), tamen tiom fortan, ke ĝi devas kontentiĝi per, mi diru, „hejma vivo“, hejma, intima kaj trankvila, anstataŭ publika kaj konkerema.

Krome, dujara neunueco interna de la esperanta mondorganizo same ne restis sen influo je la rezultoj, kiujn estus devinta doni la agado esperantista, konsistanta el societa, grupa kaj individua laboro de unuopaj esperantistoj disemitaĵ tra la tuta terglobo.

Dum la lastaj jaroj ni povas observi, ke la devizo: Esp. en la praktikon, en la lernejon ktp. estas ĉiam pli kuraĝe kaj konvinke starigata. Prenu iun ajn esperantan

ĵurnalon kaj sur ĉiu ĝia paĝo vi trovos almenaŭ kelkfoje la postulon, ke Esperanto devas esti enkondukita en la praktikon, ĉar sole ĝi korespondas nun al la kondiĉoj de helpa lingvo internacia.

La pariza konferenco: „Esperanto en la moderna vivo“, en la jaro 1937, sendube signifis gravan paŝon antaŭen. Ĝi montris al la mondo — kaj unuavice al la francaj aŭtoritatuloj — ke Esperanto povas doni sennombrajn servojn en diversaj branĉoj de la porŝtata laboro... Tiu konvinko kaŭzis gravajn konsekvencojn por nia movado en Francujo. Kelkaj ministroj (klerigaj-militistaj-poŝtaj aferoj k. a.) permesis organizi Esp.-kursojn por siaj oficialistoj kaj rajtigis tiujn oficistojn partopreni esperantajn kursojn. Oni povis noti multajn sukcesoplenajn kursojn en diversaj urboj, parte eĉ oficiale organizitajn kaj pagitajn de la koncernaj urboj. Unuvorte, same kiel en aliaj multaj landoj (aŭ eĉ pli multe), oni estis certaj, ke se oni „morgaŭ“ oficialigas Esperanton, enkondukante ĝin en la lernejon, en la poŝton,

en la fervojservon ktp., tuj oni elpaŝas el la „neofialeco“, okupante meritoplene postenon en la publika vivo.

Jes, tiel oni pensas ĉiam, estante certa, ke ni estas pretaj okupi la poziciojn donitajn al Esperanto. Antaŭ kelka tempo demandis min franca lernejspektoro, ĉu la francaj esperantistoj estas preparitaj por doni kvalifikitan esperanto-instruiston al ĉiu franca lernejo, se „morgaŭ“ oni enkondukas Esperanton en la lernejon.

Mi respondis, ke mi ne sufiĉe bone konas tiurilatajn cirkonstancojn en Francujo... Por mi tamen ne estis dubo, ke ne.

Ni ankoraŭ ne estas pretaj! En plena unueco, konsento kaj harmonio, en kunlaborado de la neŭtralaj kaj laboristaj esperantistoj ankoraŭ multe kaj streĉoplene oni devas labori por prepariĝi al tiu tasko. Ĝi venos, sed oni ne ĝin atendu kun krucitaj manoj, ĉar niaj pozicioj ne estas ankoraŭ sufiĉe firmaj kaj pretaj por elteni, por ebligi al ni fari la decidan pason, kiam la pordego de la „ofialeco“ subite malfermiĝos.

Jen ekzemplo. Antaŭ mallonga tempo, la franca ministro por poŝto telegrafo kaj telefono subite publikigis sian decidon, ke ĉiu oficisto de la koncerna administracio scianta Esperanton, rajtas pendigi ĉe sia ĝiĉeto tabulon kun surskribo: Tie ĉi oni parolas Esperanton. Sendube, tiu fakto havas grandan signifon por la Esperanto-movado, precipe en Francujo. Sed kio okazis? Tio, kion oni estus povinta antaŭvidi: mankas esperantistoj por meti en la praktikon tiun tiom gravan decidon de la franca ministro.

En multaj Francaj ĵurnaloj oni povis legi

lastatempe artikolojn je tiu tempo. Ĉiuj el ili konstatis, ke la esperantistoj ne estas ankoraŭ preparitaj.

Ĉi sekve mi tradukas artikolon el granda pariza ĵurnalo je tiu temo (Excelsior, Parizo, la 14 VIII 1938).

Depost kelkaj tagoj, ĉiu „uzanto“ de la poŝtofiĉejo havas la rajton sin esprimi en Esperanto. Amiko de la progreso kaj dezirante faciligi la rilatojn inter la eksterlandaj klientoj kaj siaj oficistoj, la ministro de la poŝto, telefono kaj telegrafo, oficialigis tiun lingvon-komunŝlosilon (passe-partout). Unu kondiĉo ekzistas: necesas, ke la koncerna oficisto ĉe la ĝiĉeto komprenu kaj parolu la lingvon de Doktoro Zamenhof. Fakte, la supera ĉefo de la poŝtadministracio rajtigis la oficejojn meti surskribojn: ĉi on parlu esperanto, se en la koncernaj oficejoj troviĝas oficistoj parolantaj tiun lingvon. Verŝajne ne ekzistas ankoraŭ multaj, ĉar depost la ministra decido, neniu oficejo estis povinta destini „esperantan tradukanton“.

Sed sendube, kun paso de la tempo, multaj oficistoj lernos tiun helpan lingvon favorigitan de la administracio, samegale kiel la anglan, germanan kaj multajn aliajn lingvojn, uzatajn de la oficistoj en la kontakto kun la kosmopolita klientaro. Same ankaŭ Esperanto estas jam akceptita en la telegrafa korespondado, ĉar la poŝtadministracio retiriĝas antaŭ nenio, kiam temas pri la kontentigo de ĝia klientaro.

*Henriko Gielb
Francujo.*

WŁADYSŁAWOWO — NOVA POLA HAVENO...

Nova pola haveno... Pli-malpli en duono de nia marbordo, en komencpunkto de la duoninsulo Hel, ĉe malfermita maro — ekestis nova haveno. Tie, kie ankoraŭ antaŭ nelonge la marondoj kun eterna obstino, kun nebremsebla forto de elemento batis la bordon, kie la ventegoj pelegis fiŝkaptistajn barkojn kaj batojn — hodiaŭ ili trovis sendanĝeran rifuĝejon.

La disvolvo de nia fiŝkaptado kaŭzis, ke ĉe la malfermita maro devis ekesti bazo por fiŝkaptistoj de la tuta apudmara teritorio. Pasis jam la tempoj, kiam la apudbordaj kaptadoj estis bazo de fiŝkaptista metio, kiam malgrandaj haltejoj formis sufiĉan rifuĝejon por simplaj, primitivaj boatoj de fiŝkaptistoj. Hodiaŭ niaj fiŝistoj naĝas en malproksimajn partojn de Balta kaj Norda maroj, por en tiuj malproksimaj ekspedicioj rikolti abun-

dajn fruktojn. Do tiuj malgrandaj haltejoj devis esti anstataŭigitaj de modernaj havenaj aranĝoj, kiuj certigus al la pola fiŝkaptado ĉiujn kondiĉojn da plena disvolvo.

Tiel ekestis nova fiŝista haveno. Władysławowo (vüadisŭavovo), tiel nomita de la nomo de la reĝo Władysław IV (Ladislao), kiu antaŭ kvar jarcentoj, en j. 1635 venis sur la polan marbordon por kontroli staton de maraj gardejoj.

Antaŭ du jaroj, la 18. III. 1936, oni enbatis en la maran fundon la unuan foston. Ĝi estis fundamento de unua havena moleo. Hodiaŭ la haveno estas preta. Ĝian basenon formas du moleoj eksteraj: okcidenta longa 763 m kaj orienta longa 320 m. Akva surfaco de la haveno posedas ĉirkaŭ 14.5 ha. Longeco de kajo entenita de la haveno atingas 1100 m. Profundeco de la haveno estas preskaŭ 6 m

En la baseno kuras moleo interna, longa 190 m, kiu estas debranĉigo de la okcidenta moleo. Krome du lignaj peronoj servos por malŝarĝado de ŝipoj.

Havenaj terenoj entenas ankaŭ ĉirkaŭ 18 ha da bordo, kie krom la konstruita jam kapitano de la haveno baldaŭ estos konstruitaj magazenoj, malvarmigejoj, fumaĵejoj, fiŝista doko k. t. p.

En suna, kiom bela, maja mateno okazis la soleno de inaŭguro de la haveno Władysławowo. La soleno de la tuta Pollando, fiero pri ĉiu akiraĵo sur sia marbordo, kaj samtempe tiel tre ĝoja momento por aroj da fiŝistoj, homoj vivantaj de la maro...

Desegniĝas antaŭ ni potencaj, necedemaj linioj de grizaj blokoj de betono. Grandaj langegoj de ondoj lekas ilin kun ia senpacienca mirego, priŝprucigas ilin de ŝaŭmo. Kaj en trankvilo de la haveno fiere elstaras mastoj de kutroj, flagoj flirtas gaje, solene — jen la agordo, kiu trapenetris la amason de la fiŝista loĝantaro, kolektiĝinta sur la kajo, sur la pontoj, sur la moleo...

Antaŭ la haveno estas ŝtonego, sur ĝi — bronza tabulo kaj surskribo:

„La 3-an de majo 1938 oni inaŭguris kaj malfermis la havenon — Władysławowo — tiel nomitan por memori maran gardejon fonditan en 1635 j. sur tiu bordo de reĝo Władysław IV“.

Tranĉo de la rubando, inaŭguro, paroladoj... La haveno estas preta, estas malfermita — komencis sian servon.

La servon oficialan, ĉar neoficiale ankoraŭ 1/2 jaron antaŭ ĝia finkonstruo ĝi jam estadis rifuĝejo por fiŝistaj kutroj, niaj kaj fremdaj, kaj eĉ por negrandaj ŝipoj komercaj, kiam aŭtunaj tempestoj movegis la grizajn ondojn de la Balta maro. Ĝuste tiu neoficiala servo de Władysławów — jen eble la plej bona pruvo, kiel tre necesa estis la nova haveno en tiu punkto de la marbordo.

La signifon de tiu haveno oni ne bezonas pravigi. Ĝi estas klara por ĉiu, kiu per koro sentas amon al la maro, kaj per penso ampleksas la tutan gravecon de ekonomia rolo de la mara fiŝkaptado. T. H.

XX KONGRESO DE INTERNACIA UNUIĜO DE KATOLIKOJ ESPERANTISTOJ

Ljubljana 6—11 VIII 1938.

En ĉarma, antikva urbo, Ljubljana, ĉefurbo de Slovenujo, okazis la Jubileo Kongreso de IKUE. Tiu kongreso devus esti la 25-a, sed pro la dummilita interrompo ĝi estis la XX, kiun oni tamen nomis la „Jubileo“.

La Kongreson invitis kaj organizis la Jugoslava Katolika Esperantista Ligo. Se oni konsideras, ke antaŭ 7 jaroj troviĝis en Jugoslavujo nur unu persono enskribita kiel libera ano al IKUE, oni devas admiri la propagandajn kapablojn de la fondintoj de tiu Ligo, la eksterordinaran vivon, kiun ĝi montras nuntempe, kaj la organizpovon de la plej parte junaj ligoj.

Vere solenan gravecon donis al tiu kongreso la patronado kaj partopreno en ĝi, de multaj eminentaj personoj, kaj precipe de ĉiuj ĉefepiskopoj kaj episkopoj de Jugoslavujo.

Lia moŝto D-ro Gregorij Rožman, princepiskopo de Ljubljana, akceptis la altan efektivan protekton de la kongreso, kaj partoprenis ĉiujn plej gravajn kunvenojn laborajn, kaj eĉ distraĵajn. Timante, ke li ne povos partopreni, pro aliaj gravaj okupoj samtempaj, li nomis sian adjunkton, kiel sian anstataŭanton, sed tiu estis plej ofte nur lia

„akompananto“. La Princepiskopo partoprenis eĉ la preparajn, kongresajn laborojn.

La unuan tagon, antaŭ la solena malfermo, li celibris solenan Meson, en la katedralo, kaj la lastan tagon, li same solene celebris la Meson je la intenco de la kongresanoj. Ambaŭ Mesojn ĉeestis, krom la kongresanoj, amaso da fideluloj, kiuj paciencie aŭskultis la predikon de pastro Modesto Carolfi la unuan tagon, kaj de alia pastro la lastan. Kvankam la amaso ne komprenis, ĝi devis aŭdi plurfoje la vorton Esperanto kaj Esperantistoj, kio faris bonan propagandon, se oni juĝas laŭ la montrita intereso post ambaŭ tre solenaj Mesoj.

Ĉiuj preĝejoj estis je la dispono de la alvenintaj pastroj, kaj ĉiutage en alia preĝejo okazis la Meso kaj prediko en Esperanto.

La solenaj kunvenoj de la kongreso okazis en la reprezenta salono de P. P. Franciskanoj, kaj la laborkunsidoj en la konsilejo de la urbodomo. La komunajn manĝojn oni ĝuis en belega ĉambrego de la plej granda hotelo en Ljubljana, „Metropol“, kontraŭ modesta sumo de 16 dinaroj (2 zł.) por tagmanĝo, bongusta kaj tre sufiĉa. Tiu prezo estis cetere speciale konsentita al la kongresanoj.

Krom lia moŝto, princepiskopo de Ljubljana, Gregorij Rožman, kaj la Banuso¹⁾ de Drava Banusejo, D-ro Marko Natlačen, oni povas vidi en la honora, patrona komitato, la nomojn de la ĉefepiskopoj de Zagreb, Sarajevo, Beograd; de la episkopoj en Maribor kaj en Praha; de la ĝenerala vikario de Ljubljana, la vicbanuso, la urbestro, la poliestro, le rektoro de la universitato, du profesoroj de la sama universitato, la estro de la klerigado, la provinestro de P. P. Franciskanoj kun aliaj pastroj, kanojnikoj, kaj profesoroj. Unuvorte, ĉiu okupanta altan postenon en la kleriga fako, troviĝis tie.

Inter proksimume 200 kongresanoj, alvenintaj el 16 landoj, troviĝis 15 pralatoj kaj pastroj: el Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Hungarujo, Italujo kaj Nederlando. Pastro Pięta, enskribinta, ne alveturis.

Krom la tre interesaj laborkunsidoj de la Kongreso, okazis du paroladoj, kiuj estas ĉefverkoj de pensa kaj lingva klareco: „La Katolika Familio“ pritraktita de paroĥestro Eras, Nederlandano kaj „La Interna Ideo“, pritraktita de lia eminenco Prof. Erdej el Hungarujo. Ambaŭ paroladojn sekvis tre interesaj diskutoj, kiujn partoprenis multaj kongresanoj.

La distraĵoj de la kongreso estis bonege elektitaj kaj pripensitaj: „Interkonatiĝa vespero“ emajlita de deklamoj, ŝercoj, muziko, ktp.: Internaciaj konkursoj, kun belaj premioj. Sed la plej mirinda, la perlo, estis la akademio, en la bela salono de P.P. Franciskanoj.

Unue, salutis juna knabino, blanke vestita, kun plenbrakoj da ruĝaj diantoj kaj rozoj. Ŝi deklamis la salutparoladon verkitan de ŝia frato Damjan Vahen: Per floroj ni volas kovri la vojnon al vi, akceptu, fratoj, fratinoj, akceptu florojn de ni. Ili estas niaj deziroj, ili estas niaj sopiroj, ili estas niaj salutoj al vi... kaj plenmane, ŝi ĵetis al la ravita aŭdantaro, la belajn florojn.

Sekvis „Simbolekzercoj“ de 14 knabinoj el Jesenice, laŭ la melodioj de „La Espero“.

¹⁾ Wojewoda.

kaj de „La Lago“, kiuj estis simpla mirindaĵo. La „Bapto ĉe Savica“, estas simbola kristaniĝo de Slovenujo, verko de France Preseren, esperantigita de Vahen, kaj prezentita de junaj Ljubljananoj kaj s-ro Peter Golobiĉ, instruisto en Jesenice, fondinto de la katolika movado kaj prezidanto de la kongreskomitato, estis interesa kaj kortuŝa.

La ekskursoj organizitaj de la kongreskomitato tra tiu belega lando: Bled, la mirinda somerrestejo de la juna neĝo Petro II; Vintgar, kun siaj sinsekvaj senfine akvofaloj, kaj aliaj, estis modelo de organizo.

Estas jam senutile paroli pri multnombraj turismaj broŝuroj en Esperanto, kiuj informas vin pri ekskursoj, kiujn vi povas entrepreni mem.

El Polujo mi estis sola partoprenanto, kaj, ĉar Francujo ne bezonis min, oni decidis, ke mi salutos la kongreson je la nomo de mia dua „Patrujo“ la „Fratlava malproksima lando“. Kaj tion mi devis fari esperante kaj pole, ĉar ĉiu reprezentanto parolis esperante kaj en la lingvo de la reprezentata lando.

Kiel memoraĵon pri tiu vere „samideana“ kongreso, krom multege da ilustritaj broŝuroj en Esperanto kaj aliaj lingvoj, ĉiu kongresano ricevis belan, riĉe ilustritan kaj dokumentitan kongreslibron, kie oni povas legi la historion de la katolik-esperanta movado en Jugoslavujo, historion de la arto en Slovenio, kun belaj koloraj bildoj ktp. Krome, la libro enhavas la fotografaĵojn de la ĉefepiskopoj kaj episkopoj patronantoj, kun priskribo de ilia sintenado al Esperanto. Tio konsistigas bonan propagandan dokumenton.

Sincerajn gratulojn kaj dankojn ĉiuj ŝuldas al la organizantoj de tiu ne tiel multnombra, kiel altgrada, internacia Esperantista soleno.

E. F. Cense.

Noto. Pro la lasttempaj okazintaĵoj, kelkaj landoj, kiuj ĝis nun donis multajn kongresanojn, tute ne aperis en Ljubljana, kio multe malpliigis la nombron de partoprenantoj!

JÓZEF WEYSSENHOFF

EL „ZIBELO KAJ FRAŬLINO“

La vojo malaltiĝis al ebenaĵo malseka, arbusta, situanta iluzie laŭ nivelo de lago, kie, malproksime post ĝi, jam kaptis sunbrilojn, alifandante ilin en ŝtalon kaj arĝenton. La ĉasantoj denove malsupreniris herbejon, al densaĵoj, spiregantaj miksitajn aromon de l' arboj, herbetoj, sovaĝaj beroj.

Ambaŭ hundoj celis al arbustaro kun streĉita atento, sentante en ĝi abundon da kaptajo.

Kviete, Foks! — Stanislaŭ admonis la ĉiam tro fervoran perdrikhundon.

Kune, la ĉasantoj kaj la hundoj, eniĝis vastaĵojn de ĥaosa salikaro, de mizeraj be-

tuloj, arbustoj diversaj etiĝintaj kaj herbaĉoj ofte elkreskantaj super arbetoj. Sub bastŭoj fleksiĝis musko pala, spongeca, makuleta de ruĝa oksikoko kaj nigra „drinkulaĉo“, ¹⁾ gutiganta akvon pro ekpremo de piedo.

Kapturnego ĉirkaŭprenis cerbojn de la ĉasantoj.

Hetka ekstaris unua, kvazaŭ en bronzon aliformigita. En ŝia tuta movo, en seriozaj sulkoj de la frunto, en vosto rigida kiel drato, estis anonco de granda ĉasbesto. Tion komprenis ambaŭ ĉasantoj kaj ekstaris post la perdrikhundino kun preta armilo. Komprenis ankaŭ Foks, ĵetis sin sur postsignon eltrovitan de l' akompanantino kaj komencis esplori kune kun ŝi — baldaŭ preterpasis ŝin, ĵetis sin flanken, per nerva galopo ĉirkaŭiris ian arbuston kaj denove ŝteliris, antaŭkurante Hetkan.

La delikata hundino ekplendis al sia estro per mallonga, signifa rigardo:

Tiu krudulo malhelpas min...

Sed en tiu okazo Hetka ŝajne ne estis prava, kiel deklaris tion per homa lingvo la posedanto de Foks:

Oni devas ataki akre — ĉi tie maljuna tetro fluas, ²⁾ kaj eble ankaŭ io pli granda. Ĉi tie estas laboro por Foks.

Oni do permesis al la perdrikhundo ĵetadi sin ambaŭflanken, ĉirkaŭflari karikarojn, poste iri per kaŭranta troto, ne rerigardante post Hetka, kiu, ofendita kaj indoplana, havante pro tio pli bonan venton, ŝteliris kun nazo fiere suprenlevita, iris tamen jam pli rapide, tirita de l' hundo facilanime fervora.

Fine ambaŭ hundoj ŝtoniĝis antaŭ arbusto, en kiu miraklo estis okazonta. Tremante per elstreĉita korpo, platigita kaj disetendita sur musko, kvazaŭ gigantaj ŝarĝoj falus subite al iliaj nukoj, — celis per malaltigitaj kapoj kaj avidaj okuloj al unu arbusto haosa, kie la ĉasantoj ankoraŭ nenion vidis.

¹⁾ marĉmirtelo.

²⁾ signifas: fali en kaptilon.

Pif!

Ĵetis sin Foks — kaj ĉimomente la salikarbuston plenigis grandega, nigra korpo fluganta, kaj la aeron bruego kvazaŭ de cent draŝiloj.

— Baĥ! — maltrafo — baĥ, baĥ! — ankoraŭ dufoje oni maltrafis -- baĥ! -- kaŭdikŝ.

La kvara apenaŭ pafo de Stanislao malsuprenĵetis el la aero nigran birdon, je sesdek paŝoj, eĉ la musko donis malakran resonon.

— Kio tio?... maljuna tetro?... — demandis Miĥaelo, perdinte spiron pro emocio.

— Kie, kia tetro?! — ekridegis Stanislao per ĝoja indigno — Urogalo! Kaj li mem ne scias, al kio li pafis!

— Ŝajnas al mi... ke pro mia dua pafo... plumoj ŝutiĝis.. — balbutis Miĥaelo.

— Plumojn ĝi ŝutis en tiu ĉi sezono ankaŭ pro vento — Sed prenu ĝin al vi! Mi mortigis multajn pli belajn dum pariĝa tempo, en plena plumaro!

— Ne, se vi diras, ke via, vi prenu.

Kaj tiel ili kverelis afable, sed esence ambaŭ estis malkontentaj: Stanislao, ke oni dubis pri lia lasta bontrafa pafo, Miĥaelo, ke li ne povis konsciencie aljuĝi la urogalon kiel sian. Kaj la kaptajo estis malofta.

Foks alportis en buŝego grandegan, nigre briletantan urogalon, kun malsupren pendanta unu flugilo kaj duone kunmetita ventumilo. Super la grizblua, fermita palpebro granda ruĝa brovo ankoraŭ ornamis la kapon de l'pereinta altrangulo de muskejoj.

La urogalo kuŝis surtere kaj neniu volis ĝin alfiksi ĉe zono. Fine Stanislao diris:

— Kial ni estas portontaj tian meleagron? ni elportos ĝin al bordo de svarmejo, pendigos sur betuleto kaj kunprenos revenante. — Kaj nun, Miĉjo, iru kun Hetka en unu direkton, mi kun Foks en alian. Kune ni nur malŝparas pulvon kaj la hundoj delogas sin.

Laŭ tiu plano la ĉasistoj traserĉadis la Gulbinajn densaĵojn ĝis tagmezo.

Esperantigis B-icz, Poznań.

LUDMILA JEVSEJEVA.

LETERO AL SOLVEIGO.

*Estu de mi salutata, Solveigo mia, milfoje!
Cignon sovaĝan mi sendas kiel heroldon al vi.
Kiam ekmuĝos torentoj, akvokaskadojn rulante,
Lasu ŝpinilon, Solveigo, — venu renkonte al mi.*

*Plu ne memoras mi, kiom paŝis someroj kukolaj,
Tagon de nia disiĝo kovras nebula kurten'...
Niaj kaŝtanoj finfloris, Solveigo mia. Aŭtunan
Plektas en kor' mozaikon la aranea faden'.*

*Baldaŭ, Solveigo, en manoj miaj hakil' rustiĝinta
Fajros, kaj falos gigantoj en apudlaga silent'.*
*Forton junecan mi sentas, kvazaŭ el stalo muskoloj,
Kvankam tempiojn ornamas jam oksidita arĝent'.*

*Trans oceanoj kaj maroj flugu, heroldo, al nordo!
Baldaŭ revenos vaganto haste tra vojlabirint'.*
*Cervon orhufan renkonte sendu, senbridan, laŭ vento.
Estu de mi salutata, Solveigo!*

Via Per Gint.

FRIDERIKO KARINTHY

BAKITA GLACIAĴO

El postmorta paperujo de antaŭ nelonge mortinta fama hungara aŭtoro-felietonisto.

En granda elmontra fenestro de iu suke-
raĵejo trovas sin tabulo kun jen tia konsi-
derinda surskribo:

„Bakita glaciaĵo“ tridek groŝojn. — Kiel
malnova adepto de Hegel kaj amiko de an-
titezoj, mi ne povas prisilenti tiun ĉi frazon.
Ĉiu „reala“ realeco estas paradoksa, aŭ al-
menaŭ neas sin mem, montrante al ni sian
duoblan vizaĝon; la veron oni devas serĉi
ĝuste sur tiu ĉi vojo. Saĝa malsaĝulo, bon-
kora malbonfaranto, dolĉa turmento, milite-
ma pacifisto, edukita filmproduktanto, feliĉa
edziĝo, jen vojo de evolucio, vojo de ĉiu
evolucio.

Kredobazo de ĉiu pensulo estas „credo
quia absurdum“, kio signifas: „mi kredas
je ĉi tio, ĉar ĉi tio estas absurdo“ nur fan-
taziulo divenas, ke nia civilizacio ne havas
alian vojon al sia evolucio kiel eltrovado de
manieroj por produkti ferajn barelingojn el
ligno t. s. kiel oni povus helpi al nia staranta
sur kapo efektiveco reakiri normalan pozi-
cion, tiam nome eble estus la homaro feli-
ĉa, ĉar, kiel ŝajnas, kaŭzo de niaj malfeli-
ĉoj konsistas en tio, ke ni povas fari ferajn
barelingojn nur el fero, kvankam tiaj rin-
gegej faritaj el ligno estus multe pli mal-
multekostaj. Kiu tion ne kredas, informu sin
ĉe germanaj industriistoj. Mi eniras do en
vendejon kaj mendas porcion da bakita gla-
ciaĵo. Kaj mi jam havas antaŭ mi pruvon.
La nebla fariĝis fakto, tial ĉar mi ekkredis.

Oni bakas ĝin je miaj okuloj. La glaciaĵo
estas trempita en kremon, metita en bak-
forneton kaj post paso de minutduono sur-
tabligita.

La pasto estas mola kaj brogas miajn.
lipojn. Kaj en la mezo troviĝas glaciaĵo ne-

tuŝita; ne fluidiĝinta glacio kaj lafo, fajro-
kaj akvo renkontiĝas sur mia palato tute
harmonie. Kiel du virinoj, inter kiuj ni ne
povas elekti. Dum bakado kreiĝas nome
dika, malmola tavolo inter tiu ĉi pasto kaj
glaciaĵo, tavolo estanta malbona konduktoro
de varmo kaj malebliganta la digeladon,
kiel asbesto aŭ jena rula vaportavolo ĉirkaŭ
rulo enprofundigita en fandiĝintan metalon.
Asertante solene, ke mi ne estas ligita kun
tiu fako de industrio, ke mi ne okupas po-
stenon de reklamĉefo kaj ke mi ricevas pro
tio nenian rekompencan, eĉ ne prezmalalti-
gon — mi anoncas al ĉiuj komune, direk-
tante sin eksklusive per ravo kaj malprofi-
temo, ke mi opinias bakitan glaciaĵon eltro-
vaĵo plene inda senfuman pulvon, sendratan
telegrafon, armitan pacon, kaj la teknikan
miraklon de internacia nacŭsmo. Kaj ankaŭ
tiujn ŝafpeltojn portatajn de stepaj paŝtistoj;
ŝafpeltojn, kiuj malvarmigas somere kaj var-
migas vintre. Oni devus fari pli multe da
similaj malkovroj kaj eltrovaĵoj, kiuj permesus
al ni sammomente ĝui la du kontraŭajn
polusojn de l' vivo. Ekzemple: subteraj aero-
planoj, boksantaj ŝakaj majstroj, utilaj poli-
tikaj paroladoj, barelo de Diogeno kun aŭto-
mobilo ĉe la enirejo, Robinson-insulo kun
radiostacio, poetoj, kiuj estas bonaj komer-
cistoj kaj ĉefoj de reklamo, kiuj komas re-
klamatan de si varon. Kaj fine: apostolo,
kiu ne revus pri tio, kion homaro bezonas,
sed pri tio, kion mi bezonas. Kaj kiu ne
atendus tiel longe, ĝis kiam bakita glacia-
ĵeto, aŭ bakita kolombeto mem en mian
buŝeton falos.

Tradukis Leonia Frucht - Neumannowa.

A. BEROHN.

IDEOJ SVARMAS...

*Ideoj svarmas en la cerb',
Samkiom eroj de kampherb';
Kaj kreskas kun la tempo-pas',
Iĝantaj granda pens'-amas'.*

*Alvenas la rikolta tag',
Por falĉi spikojn de l'imag',
Sed vane: la falĉist'-poet'
Kuradas por la pan'-pecet'.*

*Necesa al la viv'-subten':
En spik' de l' pens' ja mankas gren'!
— Kliniĝas tamen ĝi al ter',
Kaj iĝas ree huma er'.*

Bucuresti.

ALFRED KUŹNIEC.

LA VESPERO.

*Sunon ĉielrand' englutis,
Nuboj tombon al ĝi ŝutis,
El orient' nebuligita,
Venas lun' arĝentvestita.*

*Malproksimen kuras vojo;
Aŭdetiĝas hunda bojo,
Plidensiĝas la malhelo;
Steloj floras sur ĉielo...*

*Dormas birdoj, sonĝas arboj,
Preĝas en la kampo garboj,
Vent' ne blovas, mond' silentas,
Ĉio al ripozo tentas.*

RABINDRANATH TAGORE MORTANTA.

Pri Rabindranath Tagore oni lastatempe preskaŭ tute forgesis. La krizo tiagrade blindigis la homaron, ke ĝi vidas en filozofio kolekton de trapezoj, sur kiuj kelkaj cirkiŝtoj prezentas siajn plej nukrompajn „numerojn“. Cetere por malgranda plezuro de publiko.

Poezio estas tolerata sole en servo de reklamo kaj novjaraj kamenpurigistaj bondeziroj.

Krome oni rigardas mense malsana ĉiun, kiu sin okupas pri tiu „glitiga metio“, — esceptinte, se tio estas lernanto de suba gimnazio.

Ju pli antaŭen marŝas la krizo, precipe tiu de iamaj valoroj — en sepmejlaĵ botoj, des pli malpliĝas la legantaro de hinda geniulo.

Ĉar en liaj verkoj kunfandiĝas je fulme penetra voko plej home profunda filozofia penso kun plej die inspirita poezio-sento — jen ĝuste la kaŭzo de la forgeso.

Gazetoj seke raportas: „Rabindranath Tagore estas mortanta“. En momento, kiam vi legos tiujn ĉi frazojn, li eble jam estos sentime transpaŝinta la Sojlon de l'Morto, li, kiu kredis, ke nur unuoblaj sonoj pasas, sed melodio pludaŭras eterne“.

Dum ĉiulandaj ĵurnalistoj vigle ekmovas sensaciavidajn plumojn, ekscititaj pro lia de-

maharaĝa deveno, Nobel-premio, baronedtitolo, mondgloro kaj ceteraj „gravegaĵoj“, ni analizu simple Tagoran verkadon kaj individuecon, aplikante la vortojn de Ludoviko Zamenhof: „Kia li estas, kion li lasas al karaj homfratoj siaj?“.

Pri Ŝekspir ekzistas diraĵo, ke, se la mondo subite pereus kaj nur liaj verkoj savigus, la historio de tutmondo estus sur ilia bazo facile rekonstruebla. Kaj miniaturigante supran ekzemplon: „el du sole libroj „Murmuretoj de l' animo“ kaj „Donaco de amanto“ de la poeto-filozofo oni povas elserĉi plenan historion de lia riĉa mens — kaj sent vivo korpigita en abunda verkaro (kvindek ok verkoj).

La unuan el la supre menciitaj verkaĵoj inspiris meditadoj de Rabindranath Tagore pri propraj prelegoj en lia lernejo en Santiniketan.

Cizitaj, mallongaj ĉapitroj, kie enhavo eksplodigas formon, por nesciate kioman fojon pruvi, ke eminentaj spiritoj de ĉiuj raso kaj nacioj estas kunserĉantoj de la sama vojo al la sama plej valora celo: harmonio-agordo kun mondo kaj si mem. Kaj ili ĉiuj interkonsentis je tio, ke sole amo kaj paco povas suprenlevi homaron alten al ora pinto de l' feliĉeco. „La homo enhavas profundan konscion“ skribas Tagore „ke sur fundo de lia memo estas disrompo, deziregas trans-

meti ponton super abismon kaj io en li parolas, ke nur amo povas lin konduki al fina repaciĝo“.

„Fidu al amo“ li diras aliloke „eĉ se ĝi zorgojn alportas, koron vi vian ne fermu“.

Ili unuvoĉe kondamnas perforton, avidan materialismon kaj ĉion ĉi, kio senvestigas homulon de homeco.

„Kiam de principo de l' forto ni turnas nin al principo de l' belo „ni ekkonas subite“ diras la geniulo „ke dum tuta tempo ni servis al malĝusta idolo, ke forto ŝvelas per sango de siaj viktimoj, ĝis kiam ĝi krevos, ke kiel ajn ni penas pligrandigi niajn armeojn kaj armigojn konstruante ŝiparojn, amasigante nian parton en militakiraĵoj, neniam matematikaj artifikoj helpas transformi mensogon je vero, ke finfine frakosas nin la pezo de ĉiuj tiuj sinvivaj objektoj, per kiuj ni nin troŝarĝis“.

Profunde religia per tiu religieco, kiu sentas Dion en diverseco de kreitaĵoj, li ŝtaras super ĉiuj dogmoj kaj ĉiu sektaneco restas al li fremda: „Sektoj, kiuj ĵaluze ĉirkaŭas sin per muroj de ostiĝintaj dogmoj kaj esceptas tiun spontanee moviĝon de viva spirito, flegas kompreneble sian teologion, sed mortigas religion.“

Filozofio de la granda hindo estas kontraŭo de ĉiu neado. Ĝi elkreskas el vivo mem, ĝi ĉerpas el ĝia fluo bole pulsanta,

ĝi nutras sin per ĝia abundeco kaj malegaleco de formoj.

La samon oni povas aserti pri poezio de tiu plej poezia inter filozofoj kaj plej filozofia inter poetoj.

Tagore rigardas la mondon per okuloj larĝe malfermitaj, bildojn-kaptemaj kaj tra prismo de koro. El tio ĝuste rezultas plastikeco kaj plej sincera lirikismo de liaj poemoj.

En virino li vidas nek kaŭzon de peko, nek, diinon, sed naturan ĉarman kunulinon de viro, dignan esti amata, adorata, prikantata. Tion lastan li majstre realigas en poemaro „Donaco de l' amanto“ kaj parte ankaŭ en „Ĝardenisto“.

Sereneco kaj harmonieco de Tagora mondpercepto atestas pri granda influo de lia rilato al amo sur lian filozofion.

Poezia verkado de R. Tagore estas unu ĝoja himno je honoro de Dio, Naturo kaj Virino (eĉ tiam, kiam li suferas pro morto de super ĉio amata edzino).

Ĝi postlasas en animo de komprenemaj legintoj luman postsignon efektivigante varman sopirdeziron de poeto:

„Ke vi en ĝoj, de koro via eksentu mian vivan ĝojon, kiu dum iu printempa mateno kantis, sian gajan voĉon antaŭensendante tra jarmiloj“.

Leonia Frucht-Neumanowa.

1938 — CENTJARA JUBILEO DE POŝTMARKO.

Nun pasas cent jaroj depost momento, kiam tiu malgranda papereto la taglumon ekvidis...

Malgranda, multkolora papereto... Malgraŭ tio tute ne malgrava estas ĝia rolo sur la tereno de interkompreniĝo de la homoj el malproksimeco. La poŝtservado tiel grava kultura faktoro en interhomaj kaj internaciaj rilatoj estus ja nepripensebla sen tiu papereto...

Krome, la poŝtmarko estas objekto de „siaspeca sporto“, malgrava sole por „laikoj“, por kiuj la „filatelistiko“ estas nur malvalora ludilo. Tiuj „laikoj“ tamen ne povas forgesi, ke en la mondo ekzistas multaj milionoj da filatelistoj, rekrutiĝantaj el ĉiuj sociaj sferoj... Ke nur en sola Eŭropo ekzistas pli ol 10.000 da komercistoj, por kiuj la filatelistiko estas fonto de ekzistado... Ke en budĝetoj de multaj malgrandaj ŝtatoj (Luxemburg, Lichtenstein, kelkaj respublikoj sudamerikaj...), la enspezoj, devenantaj el vendado de poŝtmarkoj, presitaj speciale por filatelistaj celoj, formas unu el plej fundamentaj pozicioj de la ŝtata budĝeto... Car

ja ne nur knaboj en la lernejo kolektas poŝtmarkojn. Al tiu ludado homagias pasie ankaŭ universitataj profesoroj, riĉaj financistoj, eĉ reĝoj. La patro de hodiaŭa angla reĝo ne estis sola kronita kolektanto de poŝtmarkoj.

... Kiel ekestis la unua poŝtmarko? La londona vendisto Rowland Hill estis ĝia spirita patro. En la jaro 1836 venis Hill dum unu vojaĝo en malgrandan urbeton, kie dum la tagmanĝo en la gastejo la poŝtisto enmanigis al la kelnerino leteron, postulante afrankon. Ĉar antaŭ jaroj la sendinto donis leteron al la poŝtoficejo, kaj la ricevinto pagis ĉe la akcepto de la letero la postulitan afrankan sumon. La kelnerino prenis la leteron, rigardis ĝin kaj... redonis al la leterportisto, ĉar la enhavo ne interesis ŝin. La angla vendisto demandis ŝin, kial ŝi la leteron ne akceptis, kiu ja venis el malproksima lando, kaj ŝi respondis, ke ŝi ne havas monon por elaĉeti ĝin. La Anglo interesis pri la enhavo, pagis la postulitan monon. Sed en la letero estis nur pura blanka papereto sen iu vorto. Tiam la kelnerino di-

ris al li la veron. Ŝia amata frato loĝis tre malproksime, kaj ili ne havis monon por ofta korespondado. Do ili priparolis, ke de tempo al tempo la frato sendos al ŝi adresitan koverton, sur kies dekstra flanko supre troviĝos malgranda kruceto. Tio estus signo, ke la frato estas sana kaj fartas bone. Post la reveno al London Hill prilaboris kun sia amiko, kiu hazarde estis poŝtdirektoro, novan planon, laŭ kiu por eviti la trouzojn, estis regulita la pagmaniero, nome, la sendinto devis afranki la leteron antaŭ la forsendo. Samtempe venis al ili la ideo, ke sur la dekstra flanko de la koverto, supren sur la loko de kruceto oni devas surglui papereton kun signo, ke la letero estas jam pagita. Tiamaniere naskiĝis la poŝtmarko. Sed ankoraŭ du jaroj pasis, ĝis kiam tiu ideo estis realigita, En 1838, en Sydney, en Aŭstralio aperis oficialaj kovertoj kun signo presita sur dekstra flanko. Poste en la jaro 1840 aperis en Anglujo unuaj apartaj markoj, ne presitaj sur koverto, sed destinitaj por surgluado. Post Anglujo, Bavarujo aperigis la poŝtmarkojn en 1849 kaj en 1869 Aŭstrujo. Preskaŭ samtempe kun eltrovo de poŝtmarkoj aperis filatelistoj. La kolektado de poŝtmarkoj fariĝis kutimo, kiu tre rapide disvastiĝis en ĉiuj eŭropaj landoj. En 1852 ekestis en Bruselo la unua filatelista vendejo. Unu Belgo vendis uzitajn jam poŝtmarkojn. Post dek jaroj ĉiu granda eŭropa urbo posedis profesiajn poŝtmark-vendistojn. En 1862

aperis en Germanujo la unua en la mondo presita katalogo kun prezoj de uzitaj poŝtmarkoj kaj en 1880 ekregis vera pasio por kolektado inter lerneja junularo. Ekestis samtempe unuaj filatelistoj inter pliaĝuloj. Pli ol 5.000 grandaj aŭ malgrandaj kluboj kaj filatelistaj asocioj oficiale registritaj ekzistas hodiaŭ en la mondo.

Filatelistiko estas mistera lando, kies loĝantoj vivas sian propran, siaspecan vivon... Grizaj, seriozaj sinjoroj pasigas plej grandan parton de sia vivo en societo de tiuj malgrandaj, multkoloraj paperetoj, studentaj stampojn, perforacion, paperkvaliton kaj multajn aliajn detalojn, pri kiuj ni, laikoj, eĉ ideon ne havas.

En la okuloj de tiuj laikoj estas ja tiuj detaloj nur bagatelaĵoj, sed por specialistoj signifas ili studadon plenan de pasio kaj entuziasmo. Tiu studado estas krom tio potenca tereno de la komerco, kion pruvas ĉiam pli oftaj filatelistaj ekspozicioj, organizataj en ĉiuj ŝtatoj, allogantaj el ĉiuj mondpartoj gastojn, oferojn de tiu siaspeca tre interesa „sporto“.

Sian disvolviĝon dankas la filatelistiko grandparte al Esperanto, kiu ebligas al multnombraj aroj da kolektantoj facilan interkompreniĝon, celantan reciprokan, rapidan interŝanĝon de poŝtmarkoj inter filatelistoj, loĝantaj eĉ en plej malproksimaj landoj.

Esperantigis N. Dattnerowa.

POLUJO EN CIFEROJ

(laŭ „Mały Rocznik Statystyczny 1938 — Malgranda Statistika Jarlibro 1938“)

Plikresko de la loĝantaro:

1. I. 1895	1. I. 1914	1. I. 1919	1. I. 1924	1. I. 1931	1. I. 1938
e n m i l o j					
24,019	30,310	26,282	28,774	31,685	34,534

Elmigrado:

	1934	1935	1936	1937
e n m i l o j				
al eŭropaj landoj	21,8	19,2	29,7	78,6
al ekstereŭropaj landoj	20,8	34,6	24,9	23,8
entute	42,6	53,8	54,6	102,4

ĈU VI JAM LEGIS SUR LA PAĜO 139 LA KOMUNIKON DE PED?

Reveno de la elmigrantoj:

	1934	1935	1936	1937
	e n m i l o j			
el eŭropaj landoj	31,8	51,7	41,5	39,0
el ekstereŭropaj landoj	2,2	1,7	2,2	1,8
entute	34,0	53,4	43,7	40,8

Konsumado de viando:

	j e u n u p e r s o n o		
	1935	1936	1937
	e n k i l o g r a m o j		
entute	19,2	20,2	21,6

	j e u n u p e r s o n e					
	1931	1932	1933	1934	1935	1936
	e n k i l o g r a m o j					
Warszawa	45,9	47,4	49,7	45,0	45,7	46,7
Łódź	34,3	40,4	41,7	37,9	37,7	38,4
Lwów	—	46,0	47,3	43,6	41,7	43,5
Poznań	65,9	63,8	58,2	59,0	55,7	55,2
Kraków	67,5	62,7	55,6	52,7	58,6	59,6
Wilno	33,9	37,1	35,6	29,4	29,4	32,9
Częstochowa	42,4	40,2	37,9	36,1	36,0	35,7

Komerca bilanco:

	1929	1930	1931	1932	1933	1934	1935	1936	1937
	e n m i l i o n o j d a z ł.								
importo	3,111	2,246	1,468	862	827	799	861	1,003	1,254
eksporto	2,813	2,433	1,879	1,084	960	975	925	1,026	1,195

XXXIa UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

BERN, 29a JULIO — 5a AŬGUSTO 1939

Unua informilo**Organiza komitato:**

Honora prezidanto J. Schmid, prezidanto de 9a kongreso 1913.

Prezidanto: H. Buchli, direktoro de berna trafikoficejo.

Vicprezidantoj: S-ro Dro W. de Lerber, kaj reprezentanto de la urbestro.

Ĝeneralaj sekretarioj: O. Walder, prezidanto Esperanto Societo Bern.

M. Ardüser, F-ino G. Merz.

Ĉefkasisto: A. Hilfiker, komercisto.

Propagando, Gazetaro: D-ro A. Ebert, redaktoro.

Loĝado, manĝoj: M. Budlinger, sekretario de hotelista societo.

Ekskursoj: A. Pfister, fervoja oficisto.

Plezuroj: E. Kohlund, reĝisoro de urba teatro kaj pliaj anoj de Esperanto Societo Bern.

Adreso de leteroj: 31a Universala Kongreso de Esperanto, Bern.

Kongresejo: Kazino, urba koncertejo.

Kotizoj: Ĝis 31. 12. 38 svisaj fr. 20.—, ĝis

31. 3. 39 sv. fr. 25.—, post 31. 3. 39 sv. fr. 30.—.

La edzo aŭ edzino de kongresano, same gejunuloj ne pli ol 20 jaraĵoj pagas la duonon de tiuj ĉi sumoj.

Plej oportune vi pagas al nia poŝtĉeka konto III 11611 aŭ per svisaj monbiletoj aŭ al nia bankkonto ĉe Volksbank Bern.

Blinduloj: Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos senpage kongreskartojn, sed iliaj aliĝoj estu aprobitaj.

Aliĝiloj: Haveblaj ĉe la kongresoficejo, ĉe la ĉefaj gazetoj kaj Landaj asocioj.

Donacoj: Donacoj helpas al plena sukceso de la kongreso kaj la Organiza Komitato antaŭdankas al donacantoj.

Blindula Kaso: Por ebligi al blinduloj la kongrespartoprenadon la Organiza Komitato danke akceptas donacojn por tiu kaso.

Glumarkoj: Aĉetu niajn ĉarmajn glumarkojn. Prezo por kvindek 60 centimoj aŭ 2 internaciaj respondkuponoj.

Loĝado kaj manĝado: Komence de 1939 oni dissendos la loĝmendilojn. La berna fakulo por enloĝado prizorgos favoran kuponaron por diversaj kategorioj. Precizaj informoj en proksima kongresgazeto.

Fakaj kunvenoj: Organizontoj bonvolu frue anonci siajn dezirojn.

Oficiala kongresgazeto: Ĉiu kongresano ricevos la oficialan kongresgazeton „Ni vokas vin“, antaŭvidita estas ok numeroj, la lasta enhavos la raporton pri la kongreso. La unua numero estas multnombre forsendata kiel varbgazeto, nevizitontoj de la kongreso estas petataj transdoni ĝin al interesuloj aŭ anonci ties adreson al LKK.

KOMUNIKO DE P. E. D.

Ĉar malmultaj grupoj respondis la alvokon de PED, aperintan en n-ro 8—9 de Pola Esperantisto, ni refoje insiste petas pri nepra plenumo de nia peto. En unueco nia forto!

Multaj grupoj en Pollando restis nun ankoraŭ ekster PED. PED deziras tamen daŭrigi la kontakton kun ĉiuj grupoj sendepende de tio, ĉu ili apartenas aŭ ne al PED.

Sed por plivigliĝo de la laboroj estas necesa aliĝo de ĉiuj grupoj en Pollando. La kondiĉoj de apartenado al PED estas: oficiala aliĝo kaj kotizo de 10 gr monate por ĉiu membro. Pluajn detalojn pri PED oni povas trovi en statuto de PED, kiu aperis en n-o 6 de Pola Esperantisto de jaro 1934 kaj estas ankoraŭ ricevebla senpage ĉe la sekretario.

Ni ne instigas al aliĝo pro iaj personaj aŭ materialaj motivoj sed nur pro la bono de nia ideo. Ju pli forta estos PED, des pli forta estos Esperanto en Pollando, des pli fruktedona kaj vigla estos nia laboro. Speciale nuna kriza periodo devigas al unuecigo de nia landa organizaĵo por respondi al postuloj de la tempo.

Ni atentigas, ke nun venis ĝusta tempo por disvolvi viglan propagandon favore al E. per aranĝo de kursoj, prelegoj, ekspozicioj ktp. La raportojn pri viaj klopodoj kaj sukcesoj ni presigos en la rubriko „Pollanda Kroniko“ de Pola Esperantisto. La monata revuo Pola Esperantisto devas fariĝi ligilo inter ĉiuj E-grupoj en Pollando kaj PED,

pro tio ni konsentas gravan rabaton ĉe grupa abonado de la revuo. Detalojn petu de la administracio. Ankaŭ la libreja fako de Pola Esperantisto faciligos al vi la kompletigon de la grupa biblioteko. Speciale rekomendinda, preskaŭ deviga, estas por ĉiu biblioteko la posedado de la libro s. t.: „*Verk-oj de Fez*“ (Felikso Zamenhof), kies favora prezo por grupoj estas zł 4.50 kun afranko. La libro kaj senpage katalogo de libreja fako de Pola Esperantisto estas ricevebla ĉe la administracio.

Ĉiuj grupoj senescepte estas petataj senprokraste sendi al PED la nomaron de sia estraro kaj de siaj anoj (kun precizaj adresoj kaj indiko de profesio). Ni alvokas senescepte ĉiujn delegitojn, vicdelegitojn (same de IEL kiel de UEA), fakestrojn, kursgvidantojn ktp. al kunlaboro!

Pri la propagando de radio-prelegoj legu apartan alvokon de Varsovia Esp. Societo en rubriko „Radio“.

„KVINMIL — FONDO“.

Pluaj pagoj por la „Kvinmil — Fondo“:

Eugeniusz Rytenberg, Warszawa	zł 10.—
Dyr. Bol. Głuchowski	„ 2.—
Karol Gede, Grajewo	„ 2.—
H. W. Buda, Raciąż k/Sierpca	„ 1.—

* * *

ALIĜO AL IEL.

Aliĝemuloj al Intern. Esperanto Ligo estas sciigataj, ke oni povas aliĝi ekde 1-a de julio. Koncernaj kotizoj estas: MJ -- 5 zł., MA — 8.75 zł., MAH — 15 zł. (MJ — membro kun jarlibro, MA — membro kun monata gazeto Esperanto Internacia, MAH — membro kun semajna gazeto Heroldo de Esperanto). Kotizojn kaj aliĝilojn, kiujn mi liveras kontraŭ reafanko, bonvolu sendi al mi rekte.

Oni povas ankaŭ jam aliĝi al IEL por jaro 1939 pagante jenajn kotizojn: MJ — 4 zł., MA — 11 zł., MAH — 24 zł. kaj MS (sub-

tenanto) — 30 zł. Ĉe tio oni povas profiti, **se aliĝpago estos ĝustatempa**, jenajn avantaĝojn: nova MA — ricevos Esp. Intern. ekde novembro aŭ decembro, se li aliĝpagos al mi ĝis 25 de oktobro aŭ novembro; nova MAH ricevos Her. de Esper., ekde 1, 15. XI. kaj 1, 15. XII, se li aliĝpagos al mi ĝis 10 aŭ 25 de koncerna monato. Ĉiu novaliĝanto por 1939 ricevos krome suplementon por 1938 **senpage** kaj jarlibron 1938 kontraŭ alpago de 2 zł.

ing. M. Chmieliński
ĉefdelegito

Toruń, ul. Krasińskiego 4

BIBLIOGRAFI O.

KENSAKU SIMAKI: — **Karcero.** 163 p. 12. 19 cm. Prezo ne indikita. Eldonis Libro Kaniya, Kioto. Japanujo. El la japana originalo tradukis redakcio de „Tempo“.

La libro konsistas el 4 noveloj (Lepro, Suferado, Falo, Blindiĝo), kiuj per naturalismaj trajtoj prezentas la travivaĵojn de politikaj malliberuloj en japanaj malliberejoj.

La malliberejo-problemo dum la lastaj jaroj tute ŝanĝis siajn aspektojn: unuflanke oni komprenis, ke krimulo, pro sia ago, ne i sole estas kulpa, sed kunkulpas diversaj cirkonstancoj: liaj ekonomiaj kondiĉoj, lia eduko, la medio, en kiu li vivis kaj diversaj aliaj. Konsekvence, sub la novaj influoj de la kriminologio, oni klopodis, ke la puno ne estu retorsia nur celhava: eduko, alkitimigo al laboro kaj t. p.

Ĉiu popolo, sendube, havas belajn kaj ĝojajn flankojn, apud malbelaj kaj malĝojaj. La mallibereja problemo certe estas unu el la plej malbelaj kaj hontigaj flankoj de ĉiu popolo.

Ĉiu homo, same ĉiu popolo, ne volonte malkaŝas siajn malbelajn flankojn. Tial la mallibereja vivo estas konata nur al specialistoj kaj fakuloj (krom la malliberuloj) — la popolo ne konas tiun problemon. Tiel estas en Eŭropo: la eŭropanoj ne konas siajn malliberejojn. Ĉu do estas necese diri, ke ni tute nenion scias pri la japanaj malliberejoj?

Jen, tiun flankon de la socia vivo malkaŝis pon ni, esperantistoj, niaj japanaj samideanoj. La libro „Karcero“ estas treege interesa, ne nur por fakuloj, sed por ĉiu leganto, des pli, ke kelkloke la aŭtoro montras al ni la vivon de tiuj malliberuloj, en la libereco, antaŭe, kiam ili estis farintaj konsciencigan laboron inter la laboristoj. Tiamaniere la libro montras al ni ankaŭ

tiujn tre interesajn trajtojn de la japana socia vivo.

La libro Karcero vekis grandan intereson en Varŝavo kaj grava scienca ĵurnalo „W służbie penitencjarnej“ komisiis min traduki unu ĉapitron, kiun ĝi aperigis menciante, ke mi ĝin poligis el la esperanta traduko.

Malgraŭ, ke en la Karcero troviĝas kelkaj frazoj, mi diru „laŭ japana kompreno“, iom ne facilaj por Eŭropano, tamen oni ĝin legas „per unu spiro“.

La libro estas bele eldonita, sur bona papero, la preso estas bona kaj klara, ĝenas iom kelkaj preseraroj, kiujn oni povis eviti.

Mi rekomendas la libron kiel vere interesan kaj unikan eldoniĝon, kiu certe ĝuos en Eŭropo grandan sukceson.

Henriko Gielb.

Valora Juvelo ankoraŭ nun havebla estas la belega, ampleksa, detala gvidlibro „ROMO KAJ ĈIRKAŬAĴOJ“ Itala Esperanto-Federacio, en kunlaboro kun la potenco, aŭtoritata, mondkonata ITALA TURISMA KLUBO (Touring Club Italiano), pretigis la plej valoran juvelon ĝis nun aperintan en la Esperanto-Literaturo. Ĝi estas libro, kies vido kaj foliumado FERMOS POR ĈIAM la buŝon de la kritikantoj. Ne eble prepari pli valoran verkon en tia fako!

En tiu libro, ampleksa kaj tre detala, estas: la plej kompleta, praktika, duobla tradukilo de la frazoj bezonataj de turisto, de Esperanto al itala lingvo kaj inverse; tre interesa, utila glosaro kun la fakaj kaj specialaj terminoj de arkitekturo, de arkeologio, ktp., laŭ la alfabeto-sistema metodo „Oro“; praktikaj informoj pri la Urbo; historiaj kaj arthistoriaj notoj; 15 priskriboj de promenadoj tra la Urbo kaj ties Monumentoj kaj Muzeoj; detala priskribo de la

Vatikana Urbo; priskribo de la ĉirkaŭaĵoj, eĉ malproksimaj, de Romo; listo de la menciitaj artistoj kun indikoj; indekso de geografiaj nomoj.

Estas en ĝi ja 32 Kartoj kaj Planoj; la plejmulto prezentas kion plej valoran kaj belan oni sukcesis krei en la kartografia arto. Temas pri tre delikataj Planoj kaj Kartoj kvarkoloraj, kiuj per si mem igas jam la libron nepre aĉetinda. La tuta aranĝo estas rezulto de multjara ampleksa sperto pri praktikaj postuloj de Gvidlibro. Oni povas aserti ke tia Gvidlibro egalas aŭ eĉ en pluraj rilatoj superas kvalite la famajn Baedeker kaj similajn eldonojn.

La prezo de la libro, tole bindita, estas 27.— it. liroj (6 anglaj ŝil.; 6.50 sv. fr.; 1.50 us. dol.) afrankite.

Mendu ĝin tuj ĉe **ESPERANTO-CENTRO ITALA Galleria Vitt. Emanuele 92, MILANO**. Pagojn oni akceptas ankaŭ per ne uzitaj, validaj poŝtmarkoj de kelkaj landoj (nur post antaŭa interkonsento en ĉiu okazo), aŭ per poŝtaj internaciaj respondkuponoj.

TRA LA GAZETARO.

Lasttempe ricevitaj revuoj: Heroldo de Esperanto (semajna) kaj Esperanto Internacia (monata revuo de IEL), Esperanto (duonmonata revuo de UEA), The British Esperantist (monata revuo de Brita Esper. Asocio), Nia Gazeto (monata Esp.-eldono de „L'Éclairneur de Nice et du Sud-Est“), L'Esperanto (monata, eld. en Italujo), Jugoslaven-ska P. T. T. (oficiala organo de la Asocio de P. T. T.-oficistoj), Belga Esperantisto (monata, ofic. organo de Reĝa Belga Ligo Esperantista), La Juna Vivo (monata, organo por la junularo kaj komencantoj), La Suda Stelo (monata organo de la Esperanto—movado en Jugoslavio), Laborista Esperantisto (monata, Amsterdam), La Revuo Orienta (monata), Nederlanda Esperantisto (monata), Svenska Esperanto-Tidningen „La Espero“ (monata), Amerika Esperantisto (monata), Norvega Esperantisto (monata), Franca Esperantisto (monata), Orienta Kulturo. Voĉoj el Oriento (Hongkong), Lingva Auxiliario (Rio de Janeiro). Estonto Estas Nia (Holando).

RADIO.

Per radio Esperanto eniras sur kampon vere praktikan! Subtenu la E. dissendojn! Skribu al la Stacioj!

PROGRAMO DUM OKTOBRO

La horoj estas indikitaj laŭ mezeŭropa tempo.

REGULAJ ĈIUSEM AJNAJ DISSENDOJ.

Dimanĉe:

9.10—9.25 Kortrijk (204 m) Esperanta kroniko de G. Debrouwere.

19.00—19.30 Reykiavik (1442 m) Esperanto-kurso.

22.30—22.45 PRC 7. Mineira (960 kil.) „Momento de Esperanto“.

Lunde:

18.45—19.00 Montpellier - Languedoc (224 m) Kroniko de A. Capoulade.

20.00—21.00 JV 2 RL Caracas (51,72 m) Parolado.

22.— (proksimume) 2RO (31,13 m) Radio-jurnalo.

22.25—22.35 Brno (225 m) Praha (470 m) M. Ostrava (269 m) pri okazaĵoj en Ĉeĥoslovakujo.

22.45—23.30 Paris PTT (431 m) E. teatraĵo.

Marde:

21.20—21.35 Kaunas (1935 m) Klaipeda Memel 531 m) Lyiae (41 m) „Nia anguleto“.

22.00—22.10 Turi (410 m) Tartu (579 m) Tallinn (229 m) E. kroniko.

22.25—22.40 PRF 3 Sao Paulo (960 m)

Informoj kaj kurso.

23.30—23.45 PRF 5 (31 m 58) — PRF 2. (780 m) Rio de Janeiro. Oficialaj inf. kaj kantoj dum la „Horo de Brazilo“.

Merkrede:

2.45—3.45 XEGR (50.17 m) Mexico — Informoj.

14.00—14.20 Paris PTT (431 m) — E. kurso de C. Rousseau.

21.00—21.20 LTI Radio del Litoral. Rosario (384 m) E. kroniko.

Vendrede:

2.45—3.45 XEGR (50.17 m) Mexico — E. kroniko.

Sabate:

10.30—11.— 7 HO HOBART — E. kroniko.

16.15—16.30 Loksbergen - Limburg (202 m) — E. Kvaronhoro.

19.01—19.18 Roma (425 m) — 2 RO (25.4 m) — Turisma propagando.

22.25—22.40 PRFA Sao-Paulo (960 m) — Informoj, kantoj kaj kurso.

0.30—1.— (sabatnokte) Barcelona (377 m) k. (42 m) — pri Hispanujo.

Ni ricevis jenan alvokon:

Al Esperantaj Societoj, Esperantistoj en Polujo

Tre Estimata(j) Samideanoj(j):

Estas konata fakto, ke radio plej bone povas servi por disvastiĝo de Esperanto. Dum la lasta tempo kun ĝojo oni povas konstati, ke multaj radiostacioj en la tuta mondo praktike uzas Esperanton dum la plej diversaj disaŭdigoj. Bedaŭrinde, nur la „Pola Radio“ malatentas la gravan signifon de Esperanto kaj eĉ ĉesigis disaŭdigi prelegojn en Esperanto pri Polujo, kiuj rikoltis grandan sukceson eksterlande.

Varsovia Esperantista Societo intencas prezenti al Direkcio de „Pola Radio“ konforman petskribon vaste dokumentitan pri

apliko de Esperanto en radio, petante disaŭdigi en kaj pri Esperanto. Sed estas necesa forta subteno flanke de radioahonantoj kaj radioaŭskultantoj. Tial Varsovia Esperantista Societo presigis specialajn foliojn por kolektigi la subskribojn.

Energie kaj zorge kolektu la subskribojn kaj la foliojn resendu al Varsovia Esperantista Societo, Warszawa, Leszno 56/9.

Memoru, ke nur de via bonvola subteno dependas la sukceso de nia agado!

Kun samideanaj salutoj!

Estrato de Varsovia Esperantista Societo.

La foliojn Vi povas senpage ricevi ankaŭ ĉe Pollanda Esper. Delegitaro (P. E. D.), Kraków, Lubicz 34.

KATOLIKA ESPERANTO MOVADO.

ESPERO KATOLIKA 1903—1938.

La Katolika Esperantistaro povas esti fiera pri sia organo „ESPERO KATOLIKA“, kiu jam dum 35 jaroj, kvankam ne ĉiam regule, tamen senhalte kaj persiste aperis en la Katolika Esperanto-Mondo.

Tre longa estas la historio de la komenco en 1903, kiam nia eminentulo Pastro Emile Peltier en Tours, Francujo, fondis ĝin, ĝis la nuna tempo, kiam ĝi estas la posedaĵo de nia I. K. U. E.

Ĝi multe suferis, ĝi kvazaŭmortis kelkfoje, ĝi tamen ĉiam triumfe aperis super la ondojn, kiuj minacis pereigi ĝin.

Pri ĝia historio ni ĉi tie ne skribos. Tial ni ankaŭ ĉi tie ne nomos la nomojn de la multaj pioniroj, kiuj senprofite laboris por ĝi, senlacaj kaj neniam seniluziigeblaj.

Ni nur danku Dion, kiu tiel videble donis Sian Benon al la organo de la Katolika Esperantistaro.

Nia organo 35-jara. Kaj nun Espero Katolika daŭrigos sian vojon en la estontecon.

Tiu vojo ne estas facile irebla. Ĉar malhelaj nuboj pendas super nia Katolika Mondo kaj nia Katolika Esperanto-Mondo. Stariĝis en nia tempo bariloj, kiuj malhelpas la liberan kaj plenan evoluiĝon de la Katolika Esperanto-Movado. Multaj fidelaj legantoj ne povas daŭrigi sian abonon. Multaj fervoraj kunlaborantoj devas silenti.

Sed organo, kiu trifoje dum ĝia ekzistado estas honorita per la Apostola Beno, ne pereos. Kiel ajn malluma ŝajnas la estonto, per kuna penado Espero Katolika povos daŭrigi sian mondampleksan laboron.

Nia organo 35-jara. Ni promesu nin reciproke, ke ni kun ĉiuj niaj fortoj kaj kapabloj restos fidelaj. Kaj kun la Dia helpo ni venkos ĉiujn malhelpojn kaj Espero Katolika venkos la Katolikan Mondon.

Espero Katolika 35-jara. Ĉiam juna kiel nia Sankta Eklezio, ĝi plenumu sian taskon dum la venontaj tempoj.

(el „Espero Katolika“)

P. M. Brouwer.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO.

T. A. G. E. BIBLIOTEKO.

T. A. G. E. (la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj) fine sukcesis realigi la planon, pri kiu ĝi jam kelkajn jarojn pensis, nome la eldonadon de serio da valoraj, malmultekostaj verketoj sur la tereno de eduko kaj instruado. Kunlabore kun la nederlanda

firmo Muusses en Purmerend, T. A. G. E. nun aranĝas bibliotekon, kiu estos valora por geinstruistoj, gepatroj kaj ĉiuj aliaj, kiuj interesiĝas pri „Esperanto en la lernejon tutmondan“.

La unua libreto en tiu serio estas de la konata pedagogo Dro Ad. Ferrière kaj titolos: „Kiel eduki niajn infanojn“.

La laboro sur ĉi tiu kampo estos malfacila. Oni bezonos la kunlaboron de ĉiuj seriozaj esperantistoj kaj unualoke de ĉiuj geinstruistoj. Ne nur por aĉeti kaj legi la libretojn, sed ankaŭ por propagandi per ili inter la ankoraŭ ne interesigintaj gekolegoj kaj aŭtoritatuloj por konvinki tiujn personojn pri la granda valoro de nia internacia lingvo por la lerneja laboro.

T. A. G. E. petas la helpon de kapablaj

personoj, kiuj povos havigi interesajn manuskriptojn, ĉu originalajn, ĉu tradukitajn. Plue en ĉiu nacia lingvo ekzistas libroj, kiuj interesos internacian publikon. Tiuj tradukotaj libroj devos pritakti „literature“ aŭ popularscience temojn pri lernejo kaj edukado. La verketoj ne ampleksu pli ol 25.000 vortojn.

Oni skribu pri ĉi tiuj aferoj al la administranto de T. A. G. E.: S-ro P. Korte. Schoolstraat 13, Veendam (Nederland).

P O L L A N D A K R O N I K O.

LUBLIN. De 23. VII. ĝis 2. VIII. k. j. lublina esperantistaro gastis svedan samideaninon, ĵurnalistinon f-inon Elsa Nyberg el urbo Boden (Laponio). La neordinare simpatia gasto loĝis parte en privata hejmo de gesinjoroj Stefaniak, parte en apartamento de luksa hotelo „Eŭropa“ donita senpage por ŝia dispono de l'hotel direktoro s-ro S. Sadowski membro de P. E. A.

La 23. VII. k. j. en bele dekorita de svedaj kaj esperantaj flagetoj ejo de P. E. A. (str. Królewska 6) okazis solena akcepto, dum kiu propra esp. banĝol-orkestro, gvidata de s-ano St. Śledź (inter esperantistoj nomata „s-ro Haringo“) salutis gaston per sveda himno. Post kelkaj salutparoladoj multnombre kunvenintaj gastoj pasigis tempon en gaja atmosfero ĉe nigra kafo ĝis noktomezo.

La 27II. V. f-ino Nyberg faris en ejo de P. E. A. tre interesan prelegon je temo „Laponio, ties loĝantaj kaj moroj“, rikoltante grandajn aplaŭdojn.

La 28. VII. nia kara gasto pasigis vesperon en la „Juda Esp. Rondo“.

La 1. VIII. okazis komuna fotografiĝo kaj nia simpatio gasto, akompanata de S-ino Olga Stefaniak forvojaĝis al Lwów, Zakopane, Poznań, Bydgoszcz, Gdynia:

Krom f-ino Elsa Nyberg dum somero vizitis P. E. A. en Lublin sekvantaj samideanoj: S-ro F. Kotliński, (Piaski Luterskie), S-ro T. Pleskaczyński (Warszawa), S-ro J. Dębski (Świdnik), S-ro T. Stemplewski, (Radom), S-ro E. Danzer (Lwów), Fino I. Liszkówna (Zamość), S-ro P. Wasita (Puchaczów kaj prof. Wł. Olszowski (Poznań).

NOVA BULTENO

Sendependa revueto pri la Esperanto-movado.

Aperas provizore dumonate.

Enhavas: La Esperanto - Movado (novaĵoj) Recenzado de libroj. Ĉu vi legis? (interesaj elĉerpaĵoj el la Esperanta gazetaro). Literaturo, anoncetoj.

Nova abonanto ricevas 2-linian anonceton senpage.

Sendu vian anonctekston.

Jarabono internacia: 2 poŝtaj respondkuponoj.

Amerika Esperanto-Instituto

Rockford, Illinois, Usono.

SILKA LEGOSIGNO

kun enteksita portreto de nia Majsto.

Bela, bone prizorgita portreto de D-ro Zamenhof, kies vizaĝo kaj subskribo aperas klare sur la blanka fono.

Dimensioj: 15 cm × 5 cm. **Prezo: bfr.: 5.—.**

Mendebla ĉe: Belga Esperanto-Instituto; 127, Lange Leemstraat, 127 Antverpeno. Belgujo.

Uzu poŝtkartojn kun esper. teksto!

Poŝtkarto — Monumento de Zamenhof 0.30 zł

— Tombo de Zamenhof 0.25 „

Poŝtkartoj ilustr. de Kraków; serio 0.80 „

por poŝtelspezoj aldonu 0.10 „

Poŝtkartoj — Zamenhofa naskodomo

en Białystok; lignogravuro

de Cz. Sadowski 5 pecoj

kun afranko 0.60 „

Haveblaj ĉe „Pola Esper.“ Lubicz 34, Kraków. Konto PKO 406.660.

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto“ skutecznie można na konto PKO. Nr 406.660 lub **przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr 29**, co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

Ostatnia obniżka ceny!

Naukowe Koło Esperanckie obniżyło cenę na podręcznik szkolny p. t. „LEKCJE JEZYKA ŚWIATOWEGO ESPERANTO“ w opracowaniu prof. SYGNARSKIEGO (wyd. II. aprobowane powtórnie przez Ministerstwo WR i OP) na 1.— zł. Wpłaty i zamówienia kierować należy pod adresem: N. K. E. Bydgoszcz, pl. Wolności 9 (konto P. K. O. Nr. 210.647) lub **administracji Pola Esperantisto (Kraków, ul. Lubicz 34) konto P. K. O. Nr. 406.660. Przesyłka 15 gr.**

SCIENCA GAZETO

deziras artikolojn pri temoj de fiziko, kemio, biologio, astronomio, k. s., prefere populara verkitaĵoj, t. e. ne tro teknikajn. Ni ĝenerale ricevas sufiĉe multajn artikolojn el Usono, sed ni bezonas pli multajn el Eŭropo, kaj el aliaj landoj ekster Usono.

Presindajn artikolojn ni rekompencos. Ni havas ankoraŭ la pasintajn jarkolektojn de Scienca Gazeto (1932-1937), kaj sendos el ili, proporcie al la valoro de la artikolo, se tio estas akceptebla. Se verkinto de artikolo havas iun alian deziron, ni penas kontentigi lin. Pagi per mono estas iom malfacile kaj tion ni povos fari nur por escepte valoraj artikoloj kaj pro la altaj sendkostoj ni devos sendi malpli.

Adresu kontribuantojn kaj abonojn al:

Amerika Esperanto-Instituto, 1111 Brooke Rd., Rockford, Ill., Usono

NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABONANTOJN, ŜULDANTAJN ANKORAŬ LA ABONON POR J. 1937, PAGI LA ŜULDON JE NIA KONTO PKO Nr 406.660.

ABONO: jare zł 8.—, duonjare zł 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł 6.—. Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł 0.70, duobla zł 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł 30.—, 1/4 paĝo zł 15.—, 1/8 paĝo zł 10.—. Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł 1.—.

PRENUMERATA: rocznie zł 8.—, półrocznie zł 4.—. Dla Towarzystw i grup esperanckich rocznie zł 6.—. Zagranicą: 7 fr. szw. Numer pojedynczy zł 0.70, podwójny zł 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł 30.—, 1/4 strony zł 15.—, 1/8 strony zł 10.—. Korespondencja: małe ogłoszenia z 10 słów (prócz adresu) zł 1.—.

Przekaz rozrachunkowy: kartoteka Nr 29, Kraków 2. — Konto P. K. O. Nr 406.660.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.

BONEGA PROPAGANDILO!

Brazilaj poŝtmarkoj kun esp. teksto de IX Intern. Specimena Foiro kaj IX Brazila Kongr. de Esperanto haveblaj ĉe admin. de „Pola Esperantisto“ po 20 gr por peco. Aldonu 25 gr por poŝtelspezoj. Ni akceptas ankaŭ neuzitajn poŝtmarkojn kiel pagon.

G R A V A A V I Z O!

Reprezentanto de la dumonata, 24-paĝa, ilustrita „SCIENCA GAZETO“ estas por Polujo la administracio de Pola Esperantisto. Abonprezo jara (por Polujo malaltigita) 4 zł, pagata je konto de „Pola Esperantisto“, konto P. K. O. Nr. 406.660. Abonante nun, vi ricevas ĉiujn numerojn de post januaro k. j. Ĉiu klera homo, por kiu ne estas indiferentaj la plej novaj sciencaj temoj — devas nepre aboni la revuon!

Ĉe pagoj rimarkigu ĉiam la celon!

Abonu por jaro 1939!

ĈU VI VIDIS EKZEMPLERON DE

SCIENCA GAZETO

aŭ

NOVA BULTENO?

Se ne, petu ilin tuj senpage, poŝtkarto sufiĉas!

Adresu:

American Esperanto Institute Rockford, Illinois, Usono.